

Lernolibro de d-ro Denoel kvindekjaraĝas
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.06.12 kaj 14.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-171/Radiokasedo-171-12-86-B-1066-Claude-kaj-Andree-GACOND-Lernolibro-de-d-ro-Denoel-kvindekjaraghas.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La lernolibro de d-ro Pol DENOEL "Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto [inicado teoria kaj praktika al la lingvo esperanto]", estas unu el tiuj lernigilaj monumentoj, kiuj donis al nia movado centojn, se ne milojn da lingvo-praktikantoj. Tial nur kun granda respektemo oni povas recenzi ĝin okaze de ĝia sesa eldono. Kiuj intimiĝas kun la sekretoj de la vortfarado esperantlingva per la DENOEL-a laborilo, tiuj akiras firman lingvan fundamenton. Bildoj kaj tabeloj didaktike trafaj konkretigas tion, kion bone gradigitaj ĉapitroj instruas helpe de ekzemploj simplaj, de tekstoj bone gradigitaj, speco de romaneto rakontanta pri la vivo de la familio Lagranda. Mémorigaj resumoj parkerindaj helpas al la asimilado de la tuto, kiu estas verko de bona pedagogo. Pro tio ĝin ŝatas kaj daŭre ŝatos la kursgvidantoj kaj la lernantoj. La 6-a eldono estas pro tio bonvena kaj ĝi tutcerte naskos multajn novajn DENOEL-idojn.

A.- 1934: Unua eldono de "Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto. 1984: 6-a eldono. Jes ja, tio estas la duono de la vivo de la lingvo instruata. Fakte la lernolibro de d-ro DENOEL ne estas escepto. Abundas libromerkate lernolibroj, kiuj verkiĝis antaŭ kvindeko da jaroj kaj ne ĉesis reeldoniĝi. Dum en la nacilingva mondo tiaj reeldonoj kondukus al suspektado pri ilia metodika aktualeco, en esperantujo ili vekas respektemon. Tiuj libroj fariĝas kvazaŭ netuŝeblaj klasikaĵoj, des pli ke la amatoraj instruantoj ŝatas gvidi vesperkursojn helpe de lernigiloj, kiujn ili uzis siatempe por intimiĝi kun la sekretoj de la esperanta lingvo.

Cl.- Ĉu tiu reeldonemo fakte signifas, ke la esperanto-didaktiko tiom avangardis, ke kvazaŭ eternas ĝiaj produktoj lernolibraj? Analizo de tiu reeldona fenomeno bedaŭrinde kondukas al tute alia konkludo.

A.- Esperantujo ne nur literature, sed ankaŭ metodike, similas al insuleto perdita en oceano aŭ al oazo en dezerto, kien alvenas nur onidiroj de la beletra kaj pedagogia disvolviĝoj karakterizaj de la reala mondo. La esperanto-instruado okazas ĉefe en vesperaj aŭ semajnfinaĵ kelklecionaj kursoj, malofte en reala situacio de lerneja vivo. En tiuj kunvenoj, kiuj grupigas ĉirkaŭ ĝenerale diletanta instruanto kelkajn idealistojn jam duon-esperantigitajn, plej konvenas lernolibroj resum-karakteraj, kiel fakte estas la DENOEL-a. Multaj lernantoj ne finstudos kaj apenaŭ asimilos la lernolibran enhavon, kiu formos por la entuziasmoj fundamenton konsultatan dum ofte sufiĉe longa periodo, ĝis kiam la koncernatoj plimalpli hazarde malkovros pli konvenajn laborilojn, kiuj ne abundas.

Cl.- Ni ne havu iluziojn. Jen plimalpli la reala situacio. Kial tiu eldona stagnado kompare al la neesperanta mondo? Kial tiu manko de novaj lernolibroj? Tutcerte ne pro avangarda enhavo, sed pro financaj kaŭzoj. Ni donu ekzemplon. En la pasintaj jaroj 1984-85 Kultura Centro Esperantista (KCE) verkigis al Herbert MAYER esperanto-kurson perkorespondan por germanlingvanoj. Tiu verkigo fakte kostis pli ol 20'000 svisajn frankojn (Vidu la financon

raporton en la organo Monata Cirkulero n° 170, februaro 1986). Kaj tiu kurso aperis ĝis nun nur en provizora eksperimenta eldono multobligita.

A.- Estas fakte malpli koste reeldoni lernolibrojn, ol verkigi kaj eldoni novajn kursojn. Tial malriĉa socio kiel la esperanta devas kontentiĝi je sinsekvaj reeldonoj de la plej bonaj produktoj kaj longe pacienci, por ke novtipaj lernigiloj surmerkatigŭ. Estas same koncerne la vortarojn. En esperantujo ĉio disvolviĝas multe malpli rapide, ol en la krokodila mondo. Tial la renomo de bonaj produktoj estas pli longdaŭra, ol ĝi estus alisocie.

Cl.- Analizante la lingvouzon de la esperantistoj, oni rapide malkovras nacilingvajn karakterizaĵojn. Dum franclingvano preferas la frazojn "Mi vin dankas!" aŭ "Mi dankas vin!", ĝermano ĝenerale diras "Mi dankas al vi!" Tio estas tuj rimarkebla en esperanto-kunveno svisa.

A.- Niaj analizoj, dum ripetataj kontaktoj kun multaj esperantistoj DENOEL-idad aŭ helpe de radio-korespondaĵoj venintaj el Belgio, ebligas aserti, ke la lernolibroj ankaŭ influas la lingvan sintenon de la esperantistoj. La DENOEL-a lernolibro kondukas al kelkaj tipaj konduktotrajtoj, kiujn ni provu resumi:

Cl.- a) Nekono aŭ ignoro de la esperantlingva komado. DENOEL neniam metas komon enkonduke al subpropozicio kaj la DENOEL-idoj fidelas tiun francecan sintenon.

A.- b) Franclingve la DENOEL-idoj skribemas la nomon de la zamenhofa lingvo per majuskla E kaj sen akuta akcento; kontraŭe al la aliaj franclingvanoj, kiuj preferas la francigitan formon kun minusklo kaj akuta akcento.

Cl.- c) Gramatike la DENOEL-idoj distingas inter rektaj kaj nerektaj komplementoj, dum la aliaj franclingvanoj parolas pri objektoj kaj cirkonstancaj komplementoj rektaj kaj nerektaj. Tiu simpligo taŭgus, se aldoniĝus la koncepto pri adverbaj komplementoj, kiujn DENOEL bedaŭrinde neglektis.

A.- ĉ) La DENOEL-idoj ĝenerale teorie multon scias pri la akuzativa marko, sed praktike ili ne aplikas la lernitajn uz-regulojn. Tio spegulas mankon en la programado de la ekzercoj.

Cl.- d) La DENOEL-idoj ĝenerale akuzativigas la subjekton, kiu sekvas la netransitivan verbon: "Mankas panon!" Ho, tiurilate ili ne solas. Ankaŭ la "Esperanto-Junulkurso de SAT" ne kontraŭstaras tiun emon.

A.- e) Kvankam en esperanto la ofteco de la sufiksoj -igi kaj -iĝi estas ege alta, verŝajne pro deziro resti simpla, d-ro DENOEL dediĉis nur kelkajn liniojn al ili. Bedaŭrinda konsekvenco estas, ke la DENOEL-idoj restas ege hezitemaj rilate al la uzo de tiuj du sufiksoj, kiujn ili malprave identigas al la francigoj "faire tel" aŭ "rendre tel", kiuj konvenas, nur por verbigoj de adjektivoj.

Cl.- f) Lingve la DENOEL-idoj tendencas al malmoderna sinteno. Ili majuskligas la tag- kaj monat-nomojn, evitas la e-formojn kiel Parize, hejmen, aŭtomobile, lunde, donante sian preferon al en Parizo, en la hejmon, per la aŭtomobilo, je la lundo. Ili tre foras al la hodiaŭa parola uzo de esperanto, al la stilo de Johán VALANO kaj eĉ al tiu de noveloj kiel "Tamen

perdota" de Edmond PRIVAT. La DENOEL-a lernolibro ne estas enkondukilo al la nuntempa vivanta esperanto kaj tio aperas pli kaj pli kiel handikapo.

A.- Tiuj rimarkoj ne kredigu, ke la DENOEL-a lernolibro estas pli maltaŭga, ol la konkurencaj. Tre similajn sintenojn okazigas la aliaj ĝenerale pro samaj metodikaj mankoj karakterizaj de la jaroj tridekaj.

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*